

# Esperantista

REVUO POR ESPERANTO - MOVADO EN ĈSR

## Stále vpřed!

Prošli jsme úskalím, o něž se mohly rozbít všechny naše předválečné výsledky na poli esperantského hnutí a všechny naše naděje, s jakými jsme srostli v době nesvobody, kdy nad hlavou každého jedince visel temný mrak onoho göbelsovského *furoris teutonici*, onoho pragermánského brutalismu, který měl udusit na věčné časy svobodu člověka, příslušníků všech národů ba i Němců samých, z nichž měly se státi stroje jen poněkud podobné lidem. Kdyby fašismus a nacismus zvítězily, národy by se koupaly neustále ve své vlastní krvi vytékající z ran zasazovaných fašistickou »balilou« a německou »hitlerjugend« při každém sebemenším projevu touhy po svobodě člověka. Byl by to prostě konec svobody lidstva, zvláště ovšem slovanského. Věčná a moudrá spravedlnost však vždy na konec zvítězí, protože je chráněna zákony odvěké pravdy. Pravda, to jsou ty Boží mlýny, jež melou pomalu, ale jistě. O pravdu si rozbili hlavu Džingis-Chán, César, Napoleon, císař Vilém, Mussolini i Hitler. O pravdu si roztrhají hlavu i poslední zbytek patologické ssedliny, krvelačný Franco. Pravda zvítězí i nad atomovou pumou — najde cestu člověk k člověku a tato cesta bude ozářena světlem zelené hvězdy, světlem esperantského hnutí světového sbратření národů. A proto vy všichni, kteří milujete mír mezi národy, mír nedělitelný, jděte mezi lid a staňte se apoštoly míru a ukazujte mu cestu. Reakce nespí, hmotné zisky z válek ženou povaleče a kořistníky k novým dobrodružstvím, jež budou mít v zápětí zase válku — ještě strašnější. Nic by nebylo lidstvu osudnější než pohodlí. Bojovníky míru čeká obrovská práce; čeká i nás — esperantisty. Já sám jsem již svou apoštolskou práci započal rozhlasem dne 17. září 1945. Tento článek píše v historickém kraji pod hradem Bezdězem — v Doksech u Máchova jezera, kde začínám svou apoštolskou práci přímým osobním získáváním lidí pro naši věc. Čiňte tak také a neztrácejte jediného dne, neboť naše esperantská pravda musí být nesena širokými masami lidovými. Nikdo nám na nejvyšších místech nebude chtít rozumět, nebude-li organizačně mohutní. Naše členská čísla musí být nejméně pětimístná, to zapůsobí uvnitř našeho státu i za hranicemi.

Proto více takových nadšenců jako je samideán Václav Špúr v Doksech, jehož myšlenka zříditi zde Esperantista somerrestadejo u Máchova jezera je ve zrodu a lze od ní očekávat dobré výsledky. Jistě i ve vašem kraji se najdou podmínky pro vaši práci a proto s chutí do práce s heslem: Každý esperantista nechť získá deset příznivců, z nichž se stanou později esperantisté. Tak se důstojně zařadíme do světového hnutí esperantského a budeme moci brzy pořádati v Praze všesvětový kongres esperantistů. Cizincům takto pak ukážeme, zač jsme bojovali a co ve světě znamenáme. To bude nejlepší služba čs. esperantistů naší nové, lidové demokratické republice a tím i celému demokratickému světu, jemuž je míru tolik zapotřebí. Práci vaší zdar a chutě vpřed!

Adolf Malík, předseda Svazu esperantistů ČSR.



Julie Šupichová (nask. 27. I. 1884)  
elektita honora membrino de la Asocio dum tiu-jara kongreso.

## Lingvo.

V této rubrice budeme přinášeti články a poznámky z nauky o esperantu, o jeho jazykové problematice i cvičné texty. Dnes předkládáme první úkol k překladu. Pečlivě jeho vypracování je znamenitým cvičením v jazyce. Snažte se, prosíme naléhavě, aby Vaše překlady byly co možná přesné, ale při tom stejně plynulé a výrazné jako originál. Společné překládání nebo přirovnávání vlastních překladů může být velmi zábavným a poučným bodem programů esperantských schůzek. Vypracovaný překlad nám pošlete! Uveřejníme nejlepší, oznámíme jména všech účastníků a ocenění jejich práci. Překlady zašlete do 15. května.

### Úkol 1.

Z rozhlasového projevu pana presidenta 24. prosince 1945:

Řešíme právě veliké své problémy politické. Odsun Němců z Československa je veliká revoluční a pro nás radostná a uspokojující událost. Mohli jsme tyto výsledky očekávat v době našich útrap v r. 1938? Slyšeli jste v těchto dnech z Norimberka plány K. H. Franka a t. zv. protektora Neuratha o zničení našeho národa a naší země. Dnes nám spojenci zaručují vystěhování Němců během r. 1946 z naší země. Je to spravedlnost dějin, jedna z nej-

oprávněnějších a nejvyšších, k nž se po této válce dojde. Je to jedna z velikých našich národních událostí, která aspoň vnitropoliticky úplně změni celé budoucí dějiny našeho národa. Važme si toho, radujme se z toho a provedme to důstojně a lidsky a z mravního hlediska bezvadně.

Provedeme v prvních jarních měsících nové volby a konstituování nového parlamentu ústavodárného. Učiníme to důstojně, spravedlivě a slušně. Všechny strany politické ať jsou si vědomy, že po volbách musí znovu spolupracovat a utvořit parlament, který svorně a společně musí dohodnout konstituci a tvořit dělnou většinu pro celých šest let poválečných. Volební kampaň nesmí se stát bezohledným bojem stranic-kým. Rád bych viděl, kdyby určité otázky z volebního boje byly vůbec vyloučeny; na př. otázka našeho spolenectví se Sovětským svazem. To je otázka celonárodní, otázka nás všech společně a není a nebude prostě předmětem žádného sporu. V jiných věcech bych si přál dohodu už během doby předvolební: na př. souhlas v hlavních liniích naší budoucí konstituce a dohody mezi Čechy a Slováky.

Otázka plného a správného fungování národních výborů a některých našich úřadů, a vůbec našeho nového právního řádu měla by býti také už plně a definitivně vyřešena. Stále slyším, že se právních norem a předpisů a našich nových právních řádů dosti nedbá. Mnohé úřady a mnozí jedinci dosud překročují z vlastní vůle svoji pravomoc; své povinnosti vládou a novými zákony jim určené nekonají nebo je libovolně překročují. Nesmějí zapomenouti, že budou za to voláni k odpovědnosti, jakmile se všechny věci budou stabilisovat. Znakem stabilisace a zákonného vyrovnání nových poměrů ve státě je přesné plnění zákonů a respekt k danému právnímu řádu, který byl novou vládou vydán.

Při časté návštěvě venkovských národních výborů na Hradě slyším ze všech krajů republiky radostně konstatování, jak se usilovně pracuje, jak každé město si tvoří velké konstruktivní plány, jak se všude po republice pracuje sociálně, jak se zachraňují děti z poválečné bídy a těžkostí, jak se pracuje ve věcech školských a kulturních. Není snad jiné země, která by nás v tomto velikém plánování a elánu budovatel-ském předstihla.

## Frant. Kupka: Duopo negra.

Pacon al leganto de tiuj ĉi folioj! Por miaj infanoj kaj iliaj idoj, por instruo de ĉiuj, kiuj finlegos tiujn ĉi liniojn, verkitajn per mano maljunula, enskribas Georgo Aari, kavaliro el Aarenburg, tiun ĉi historion pri blazono de Duopo negra, donacita al familio Aarenburga de mortinta imperiestro Sigmundo Luksemburga:

Kiam mi estis dek-jara, preparis sin mia patro, Henriko Aari, por militiro kontraŭ ĉeĥaj husanoj. Imperia parlamento en Nürnberg invitus solene kaj insiste ĉiujn princojn, grafojn, kavalirojn kaj urbanojn de la germana regno, ke ili preparu armeojn kontraŭ herezuloj, kiuj senkompate persekutis sanktan religion kaj ĵus en tiu tempo, en somero 1426, sieĝadis kristanojn de la urbo Ústí, kiu kuŝas ĉe rivero Elbo. La ĉefa gvido de la militiro estis konfidita al la plej proksimaj najbaroj de la ribelinta reĝlando ĉeĥa, al markgrafoj de Meissen kaj Saksujo, kiuj kunigis okdek mil armitulojn kaj multan monon por krucmilito kontraŭ skismuloj.

Mia patro »Henriko Aari« armis dudek kvin tre bonajn dungitajn soldatojn german- kaj franclingvajn, homojn el montaroj apud-rejnaj eĉ el ĉirkauaĵo de Genova, kiuj ĵus en tiu malkvieta tempo ne havis gajneblecojn en haveno Basela nek en ŝipoj de mia patro. Mia patro, deveninto el familio komercista, riĉa burĝo, urbano Basela, havis depost sia infanaĝo emon militistan kaj al sia deziro supreniĝi en pli altan klason d-ediĉis multajn posedaĵojn surterajn. En tendenco proksimiĝi al kufimaro kavaliro li ne nure aranĝis sian domon en Basel sur la Foirejo palacmaniere kun armiloj kaj malnovaj flagoj en solenmanĝa halo kun pinaklo sub tegmento kaj kun metalpordo, sed li eĉ aĉetis de ebria kaj malriĉiĝinta grafo el Aarenburg, freneza maljunulo, kiu, la lasta de sia familiaro, formortadis en kastelo de siaj antaŭuloj, duonruiniĝintan Aarenburgon ĉe rivero Aaro, trovinte tiamaniere al sia profana nomo atributon certé dignan, sed en nomaroj de nobel-listoj de la Sankta germana regno ne enskribitan. Mi naskiĝis en tiu ĉi kastelo kaj mia patrino, francino el komercista familio en Yverdon ĉe la lago Neuchatela, vane dum jaroj serĉadis iom da suno kaj ĝojo en malvarmaj kaj mallumaj haloj de la malserena konstruaĵo. Tial ŝi kun mi — ĉiam kiam la patro retiriĝadis pro komerco en Baselan domon — forveturadis en vitejojn super sudaj lagoj kaj juniĝadis almenaŭ dum semajnoj sub la ĉielo, kies blue nebulema silento kantas pri suna paco. Mi vivis infanaĝon inter milito kaj paco ne nur tial, ĉar tiel ordonadis historio de la epoko, sed ankaŭ pro karakter-malsameco inter eksplodeme militema patro kaj klare kvieta animo patrino.

Kiam en la jaro 1426 mia patro kun dudek kvin armituloj ekiris al Nürnberg kaj Meissen, adiaŭis lin la patrino tiel, kiel ni adiaŭas homon, kiu ne povas venki pasion pelantan lin en pereon. Pompe bruis la patro per sia kavaliro vesto sur eluzitaj ŝtuparoj en Aarenburg kaj eldirante terurajn malbenojn kontraŭ herezula raso husana li promesadis al dungitaro parton el militakiraĵo, kiun li al si alportos el malproksima Praha. La servistaro vokis al kavaliro komercisto »vivu« kaj la paroĥestro el Aarenburg, benante glavon de la patro, petis lin alporti kelkajn sanktajn relikvojn el Bohemio, kie en malproksima lando estas da ili el tempo de Karolo IV multego. La patro promesadis, ridis, kuraĝe ekkriadis, forte trinkis kaj severe komandis siajn dungitajn militistojn, kiuj sentis sin en sia armilaro kaj kun glavoj partoprenantoj de ridiga karnavala procesio. Tiel petoleme ĝi jam depost longe ne estis en Aarenburg kaj la maljuna freneza kavaliro, estinta posedanto, malriĉulo kiu rajtis loĝi en sia estinta kastelo ĝis sia morto, ekdancis sur korto groteskan dancon, babilante malĉastajn francajn versojn pri Venuso, milito kaj vino.

Mi adiaŭis la patron indiferente kun unusola bedaŭro en la koro, ke mi ne rajtas kun li militiri en la herezulan landon kaj ke mi ne rajtas svingi glavon kaj komandi armitajn knabojn el la rejnaj ŝipoj.

En septembro samjara venis letero de la patro el la ĉefa batalejo. La patro priskribadis la batalon apud Ústí, kie la krucmilitistoj renversis veturilan ŝanzon de iu husana pastro, kies nomo estis Dominus Procopius Rasmus, kaj kie nia patro en terura glavbatalo per unufoja bato fortranĉis

## LOKAJ INFORMOJ.

kapojn de du sovaĝaj husanaj batalantoj. Plue skribis la patro pri plifortigoj, kiujn la malamikoj ĉe Ústí ricevis el la herezula Praha, kaj pri lukto, kiun la krucmilitistaj armeoj gviditaj de markgrafo saksa batalis en montaro kun atakantaj husanoj. La letero estis skribita en iu vilaĝo kaj finis per koleraĵaj vortoj kontraŭ malkuraĝaj dungitaj soldatoj krucmilitistaj kaj teruraj malbenoj kontraŭ la pastro Prokopio, estro de herezuloj, viro, kiu gvidas ja en batalo, sed mem manojn per sango ne makulas. Pri li skribis la patro, ke li parolas latine kaj germane kaj ke per traktado antaŭ la batalo enlogis kristanajn armeojn en preparitan kaptilon. — Patra letero similis pli al milita bulteno el batalejo ol al sciigo porfamilia. Sole per du vortoj ĝi salutis edzinon kaj la amatan filon.

Baldaŭ poste venis sciigoj pri terura malvenko de krucmilitistaj armeoj. El la armituloj de la patro revenis du, sed la patro ne alveturadis. Al la zorgoplenaj demandoj respondadis la patraj uloj, ke sinjoro Aari estis lastan fojon kun ili ie en la montaroj, similantaj ekzaktege al pejzaĝo ĉirkaŭ la rivero Aaro. Sed la rivero en Bohemio nomiĝas Elbo kaj estas pli larĝa. Poste ili, laŭ ilia diro, fuĝadis per vojo nevojo kaj ĉiu atentis unusole sian propran savon. La patro ne venadis. Kaj li ne estas veninta.

En Basela domo, kien transloĝiĝis kun mi mia patrino administrante la patran komercan heredaĵon, estis multo da ploro, sed malmulto da espero. Mia infana koro pleniĝis per malamo al tiuj, kontraŭ kiuj en nomo de mia religio militis mia patro kaj de kiuj li ne revenadis. Kolero kontraŭ ĉefaj herezuloj kreskis en mi interne kvazaŭ kancero mordante miajn internaĵojn per infera fajro. Neniam mi amis la patron tiom, kiom tiam, kiam li perdiĝadis por ĉiam al mi. Mi legis kun neinfana pasio ĉiujn verketojn, kiuj tiam kontraŭ herezuloj disvastiĝadis en Germanujo kaj en tuta kristana mondo, kun venĝa emfazo mi aŭskultadis voĉojn predikistajn kaj misiistajn en preĝejoj kaj en foirejoj, imagaĵo de Bohemio transformiĝis en mia animo en terurregionon kaj herezuloj en diablojn de nehomaj figuroj. Jen la sovaĝuloj, kiuj detruis aŭstrian Retz, forbruligis Pressburgon, kolorigis per kristana sango Danubon, dezertigis Bavarujon kaj Brandeburgon, malordigis kvieton de Saksujo, kaj venis jam antaŭ Nürnbergon, vastigante antaŭ si kaj post si konfuzon kaj malbenadon, kaj krome nomigante tielajn milititojn ĉarmaj veturadoj. Mi kreskis en senpova furiozo kontraŭ herezuloj kaj mi estus forkurinta el patrindomo kaj aliĝinta al krucmilitistaj armeoj, se ne estus malhel-pinta min en tio la fila obeemo.

Dume, en la jaro 1429, mi fariĝis merite de mia perdiĝinta patro kavaliro. Mia patrino ricevis alskribaĵon de la regna kancelario, subskribitan de la reĝo kaj imperiestro Sigmundo, en kiu oni sciigis, ke mia patro, Henriko Aar, urbano Basela, malaperinta, estis suprenigita en staton de hereda kavaliro kun atributo el Aarenburg kaj ke blazono de lia familio estos du kapoj nigraj sur verda fono por rememoro pri du malamikaj kapoj, kiujn kavaliro el Aarenburgo, tiam ankoraŭ urbano Henriko Aari, fortranĉis per unusola svingo de sia aŭdaca glavo en batalo apud Ústí en reĝolando Bohemio.

Du nigraj, du sovaĝulaj kapoj: ĝuste tiel mi imagis al mi la ĉefajn herezulojn kaj tiel ilin en ardigantaj paroladoj priskribadis al popolo tiuj, kiuj revenadis el batalejoj. Mi estis kavaliro kaj mia blazono estis du fortranĉitaj nigraj kapoj de bestaj malamikoj. — En latina lernejo mi fariĝis objekto de admiro kaj envio. Mia verda sigelringo kun du nigraj, malférmitaj, grimacaj kapoj ĉirkaŭiris ĉiutage inter la benkoj. Mi atendis la momenton, kiam mi iros en batalon, por ke mi rekompencu al la imperiestro la nemerititan honorigon: Mi, la juna kavaliro el Aarenburg, estas destinita, por ke mi detruu sovaĝan genton de nigraj herezuloj, makulon de kristana mondo kaj fiherbon inter la nacioj! Mi venĝos la patron kaj glorigos mian junan blazonon!

Sed dume en la tuta regno, inter la tuta kristanaro, estiĝis laceco el luktoj kaj la imperiestro kaj la papo decidiĝis alparoli la herezulojn per vortoj de paciĝo. Kun mirego mi aŭdis, ke en mian naskiĝlokon alveturos delegitoj de skismuloj, por ke ili stariĝu antaŭ koncilio eklezia kaj defendu tie ĉi laŭ la Sankta Skribo sian opinion en aferoj religiaj. Kun teruro mi ekkonis, ke al tiu ĉi gento estos preparita en la urbo digna akcepto kaj ke episkopoj kaj kardinaloj de 1' eklezio disputos kun

*Batov.* En burĝa kaj industria lernejo organizas kurson por studentoj Otakar Hoffmann, faka instruisto (de februaro 1946).

*Bojkovice.* Prelegon pri Esperanto aranĝis Slava revolucia klubo (Slovanský revoluční klub) kun helpo de Loka kultura komitato (Místní osvětová rada) la 10-an de marto je la 14 horo en la lernejo. Prelegis Jan Tichoň. Dum la tuta tago estis en la lernejo ekspozicio de esperantaĵoj. Post la prelego estis akceptataj aliĝoj al kurso, kiun gvidas ankaŭ s-o J. Tichoň. Kursotizo Kčs 80.— Al la prelego invitadis grandaj belaj afiŝoj.

*Boskovice.* Unua kunveno de la Klubo en la nova respubliko estis la 16-an de aŭgusto. Estis tuj elektitaj novaj funkciuloj. La Klubo komencis tre aktivan vivon. Al postministerio estis sendita peto por permeso de Esperanto en korespondado fremdlanden, IEL kaj UEA estis salutitaj, komenciĝis kunlaboro kun loka skolta grupo, estis ellaborita bone pripensita detala memorandumo por komitato de EACSR pri organizaj formoj kaj postuloj. Estas en ĝi proklamita postulo de unusola organizo kaj devo, ke ĉiu loke organizita esperantisto estu per tio jam ano de la nacia kaj internacia centro. La ideoj tie esprimitaj trovis plenan aprobon dum agado de nia kongreso kaj ili estas efektivigataj. Kurso de la Laborlernejo en oktobro estis organizita kun tre bona propagando kaj en modela kunlaboro de la Klubo kun ÚRO. Funkciuloj de la Klubo estas: Alois Řehořek, prezidanto, Frant. Dvořák, vicprez., Frant. Lunáček, sekretario, Alois Patloka, kasisto.

*Brno.* La 28. 5. 1945 prezentis la Klubo anoncon pri renovigo de sia agado al Nacia komitato kaj tuj atingis parolan aprobon fare de prof. D-ro. J Kroha, ĉefo de kultura sekcio ĉe la Nacia komitato. La 12. 6. okazis ĝia unua postmilita kunveno, tre bone vizitata. Konfirmo pri plua ekzisto de la klubo venis de Landa nacia komitato la 2-an de aŭgusto. De l' unua kunveno ĝi penas restarigi nian movadon en Brno, kunhelpi al la sama en aliaj lokoj, reellerni esperanton k. havi bonan financon bazon. En ĉiuj rilatoj ĝi estas survoje al bonaj rezultoj. Al ĈS. Ruĝa Kruco ĝi donacis Kčs 500.— al Lidice ankaŭ Kčs 500.—. Jam en la unua kunveno ĝi entreprenis paŝojn

por ekkontakti kun IEL London k. SEU Moskva por ricevi informojn. Memkomprene oni ĉiam klopodas pri la plej harmonia kunlaboro kun EA. Komitato estas: prez. J. Vondroušek, vicprez. K. Drdla, I-a sekr. J. Geryk, II-a sekr. R. Nečas, kas A. Nečas, bibliotek. N. Zitová, komitatanoj M. Adamcová, T. Kilian. —

Kurso en ŬRO - Labor - Lernejo estis bone preparita. Tuj post ricevo de la cirkulero E. K. ekkontaktis kun ŬRO. Rezulto estis, ke ŬRO alterne kun la klubo ofte anoncadis en ĵurnaloj la preparatajn kursojn. La kurso estis fine komenĉigita la 8. 11. kun 30 partoprenantoj. Tre bonajn enkondukajn, rekomendajn k. instigajn vortojn diris sekretario de Ŝkola práce s-ro Ulrich, al kiu ni ankaŭ ĉi tie dankas pro vasta subteno, kompreno k. ĉia laboro por sukceso de la kurso. Poste paroladon havis k. la instruadon komencis s-ro Vondroušek. La dua kurso estas preparata, en la urbo pendas 500 afiŝoj k. estas presite 2000 flugfolioj. Komenco de la dua kurso en januaro.

*Břeclav.* Esperanto estas diskonigata per afiŝetoj kaj esperantajj en montra fenestro de Hlávka-drogerio depost novembro. La aferojn gvidas s-o Rudolf Trojna, tajloro, nám. Petra Bezruče 20.

*Česká Skalice.* Kurson por skoltoj gvidas s-o Vondráček.

*Dolní Bousov.* Kurso por 23 p. gvidita de Karel Šolc en oktobro-decembro. En oktobro varba ekspozicio. Lokan movadon gvidas MUDr. Fr. Vaněk.

*Dvůr Králové n. L.* Prof. Jan Filip instruis en oktobro-decembro Esperanton en loka skolta grupo.

*České Budějovice.* E. K. La Progreso reviviĝis en junio kaj konfirmis niajn cirkulerojn. En fino de oktobro ĝi aranĝis kurson publikan. La 24-an de septembro estis informa vespero, el kiu estis sendita saluta telegramo al prezidento Beneš. — Jarkunveno okazis la 15-an de novembro. La klubo longe traktis kua la loka ŬRO Labor-Lernejo, kiu ne volas enmeti esperanton en sian kursaron. Ankaŭ nia letero restis sen efiko. La klubo eldonis glumarkojn kun teksto »Rememoru 1939—45«. Nia Libro-Servo vendas ilin 12 ekz. po Kčs 1.50.

*Černilov.* Parolado pri Esperanto de s-o Pytloun.

perfida pastro, Prokopo la Raza, kiel egalulo kun egalulo. Ĝi estis fino de 1' eklezio! Ĝi estis disfalo de justeco kaj ordoj Dia kaj homal!

Grandaj aroj de Basela popolo kaj vinkulturistoj kaj kampistoj el malproksima ĉirkaŭaĵo premis sin en frosta januara tago, post Nova jaro 1433, antaŭ Baselaj pordegoj kaj en urbaj stratoj, por ke ili ekvidu delegitojn de la ĉefaj herezuloj, kiuj en granda procesio alveturis el Bohemio al la koncilio. Mi ne estis inter rigardantoj kaj fenestroj de nia domo sur Foirejo estis vualitaj, kiam apude veturis skismuloj, kiuj estis donintaj al si nomojn de Taboranoj, Orfuloj, Praganoj. En tri gastejoj ekloĝis tiu ĉi triopa kaj unusola senditaro kaj Prokopo la Raza, pastro kaj militestro, loĝis en la plej granda kaj plej bela gastejo »Ĉe la tri reĝoj« sur la Rejna bordo mem. — La plej mirige estis, ke la basela popolo konsentis kun aŭfaleco de urbestraranoj kaj ke junuloj kaj majunuloj disvastigadis post bonvenigo kun nekaŝata kontenteco: »Ili ja estas ankaŭ homoj, kaj krome homoj belkreskaj kaj kuraĝaj!«

Mia deksepjara fajra intelekto malakceptadis tiujn ĉi parolojn.

Nevolonte mi aŭdis sonoradon en Münster-katedralo invitantan virojn de eklezio kaj la herezulojn al komunaj intertraktadoj, kaj kun kolero mi ekaŭdis sciigon pri interparoloj de la papa legato, iam de Husanoj tiom humiligita kardinalo Juliano Cesarini, kun pastro Prokopo kaj pagana ĉefepiskopo Johano el Rokycany.

Unu nokton en fino de januaro en la jaro 1433 estis al mi inspirita ideo: »Neniĝu la hontigan traktadon kun herezuloj kaj meritiĝu pri afero justa! Mortiĝu tiun, kiu mortigis vian patron! Mortbatu ĉefon de la ĉefa senditaro, la pastron Prokopon!«

Subite estis al mi facile kaj gaje. Tiel, kiel al la patro tiam, kiam li antaŭ sep jaroj preparadis sin al la krucmilitistoj. Mi prenis el kesto de la patrino saracenan ponardon, kiun antaŭ kvindek jaroj alportis ŝia avo el la Sankta Lando en Yverdon kiel rememoraĵon pri pia kaj samtempe komerca vojaĝo. Dum gaja mateno — el Alpoj blovis malvarmo kaj frua printempo samtempe — mi iris laŭ la ŝaumanta Rejno al la ligna ponto. Mi rememoris la patrajn ŝipojn, kiuj tie ĉi alboridigadis, mi alridis al rajdanto, kies ĉevalo ektimis pezan veturilon venantan el la dua rivera bordo, mi kraĉis petole en duonverdan akvon, volante trafi nigriĝintan glacipecon, kiu restis tie ĉi apud bordo kiel rememoraĵo pri vintro kaj saluto el la Alpoj transpasejoj, kaj mi eniris en la gastejon »Ĉe la tri reĝoj«. Al servisto mi diris, ke li anoncu al sinjoro Prokopo, ke intencas kun li paroli kavaliro Georgo Aari el Aarenburg.

En momento mi staris antaŭ la viro, kiu estis mortonta per mia mano. Pastro Prokopo stariĝis, streĉis al mi la manon kaj demandis, ĉu li estas parolonta latine aŭ germane. Mi forgesis en tiu momento ĉiun mian latinon kaj mi elspiris germanlingve: »Redonu al mi la patron!«

Pastro Prokopo sidiĝis kaj montris al mi per kvietaj gesto apogseĝon kontraŭ si. Li rigardis en miajn okulojn fikse, serioze, gravmiene kaj silentis. Mi sidiĝis sub lia rigardo kaj silentis ankaŭ. Kaj mi vidis antaŭ mi altstaturan viron en nigra sutano, glate razitan palan mienon kua malhelaj, mire afablaj okuloj, ekflaviĝinta frunto sen unusola falto, potenca nazo kaj duongriza hararo sur verto kaj kaj tempioj, hararon de monaĥo aŭ de ermito, tondita en kronoformon ĉirkaŭ la kranio. Belaj manoj kun blankaj maldikaj fingroj ripozis kviete sur genuoj. Li rigaris min tempeton kaj sonore, preskaŭ komande ekparolis:

»Ripetu vian peton, kavaliro!«

Mi ekkriis: »Pastro Prokopo, redonu al mi la patron!«

Prokopo, similanta en tiu momento al konfesprenanto, demandis min paceme: »Via patro mortis en milito kontraŭ mi?«

»Malaperis en viaj montaroj. En batalado kontraŭ herezuloj. La kavaliro el Aarenburg! En la jaro 1426! Fortranĉinte antaŭ tio du herezulajn kapojn! Jen, pastro, ilil!« Kaj mi montris al li ringon sur mia dekstra mano.

Prokopo prenis mian manon en la sian dekstran kaj kun intereso li rigardis la ringon. Ekridetis kaj lasis mian manon. Subite estis lia mieno plena de laceco kaj tristeco. Li komencis ree paroli:

»Vi estas veninta por min mortigi. Montru al mi la armilon!«

Mi faris tion.

»Bela laboraĵo saracena,« diris li kun intereso. »Mi ankaŭ estis en la

**Hradec Králové.** Pluraj el antaŭmilitaj fervoraj funkciuloj de la Klubo foriris en aliajn urbojn. Ekz. Otto Sklenička, kiu estas nun prokuristo de Živnobanka en Teplice. La aferojn klubojn gvidas nun Fr. Pytloun (II, Riegrovo nám. 1010). Proksime de la stacidomo estas en tre bela elmontra fenestro depost 11-an de novembro ekspozicio de esper. literaturo. La kurso en ŬRO-Labor-Lernejo komencis en novembro, estis anoncita per grandaj afiŝoj kaj ankaŭ la disaŭdiga stacio Hradec Králové anoncis komencon de la kurso. Partoprenis 26 p., instruis F. Pytloun, la kurso finis per kursfina festo la 17-an de marto. — Dua kurso komencula de E. K. depost 23-a de februaro kun 15 p. Instruas Fr. Pytloun. — En la Radio-stacio parolis ĉefe pri E. prof. Miloš Lukáš la 5-an de februaro. Lia prelego tre plaĉis ankaŭ al ne-esperantistoj.

**Chodov u Karl. Varů.** Kurso komencula daŭras depost 9-an de januaro. Organizanto de la loka movado estas Alois David, staciestro.

**Karlovy Vary.** Kurso en la ŬRO-Labor-Lernejo komencis la 29-an de januaro 1946, kun 16 p., instruas F. Milek, Koněv-str. 5.

**Klatovy.** Kurso en ŬRO-Labor-Lernejo komencis 14. 11. kun 19 p. gvidas Frant. Patera (Měchurova 370/II).

**Klimkovice ve Sl.** Kurso kun 16 p. finis la 2-an de februaro. Komencis nova kurso kun novaj partoprenantoj. Ambaŭ kursoj gvidataj de s-o Zdeněk Raška. Loka grupo estas fondata.

**Liberec.** S-o Bohumil Novotný instalis en novembro sur kvin taŭgaj lokoj de la urbo kestetojn por propaganda materialo, kiuj elvokas daŭre intereson de la preterpasantoj. En sia komercejo (Pražská 3, telefono 3706) li havas Esperanto-flagojn flirtantajn inter la ceteraj flagoj, kiujn li fabrikas. Li presigis 2 propagandajn presajojn ĉeflingvajn, kiujn li disvastigas. Loka grupo estas fondata.

**Mladá Boleslav.** Du kursojn por sume 60 kursanoj gvidis depost oktobro ŝtate ekzamenite Esperanto-instruisto K. Šolc. La kursoj finis per kursfina festo la 26-an de januaro 1946.

**Mnichovo Hradiště.** Multaj el la antaŭmilitaj membroj foriris el la urbo. La restintaj jam en septembro grupiĝis. La organizan laboron gvi-

Sankta Lando. Por pilgrimi kaj komerci. Ĉu via patro ankaŭ estis en la Sankta Lando?«

»Ne, ĝi estas rememoro post la praavo. — Vi estis ankaŭ komercisto?« mi demandis kaj tiu ĉi vorto, elirinta el mi kontraŭ mia volo, estis mia sorto.

»Mi estis. En junaĝo. Kiel patro kaj avo kaj kiel avo el patrina flanko. Antaŭ ol mi estis ekaŭdinta prediki Majstron Johanon. Ĉu vi, sinjoro, estas ankaŭ el gento komercista?«

Mi jesis.

»Kaj ĉu vi kredas je eterna savo?« daŭrigis li subite per voĉo de disputanta teologiisto.

»Mi kredas!« diris mi iom solene kaj junule.

»Kredu, ke via patro, se li batalis por afero de sia justeco kaj sia religio, akiris la savon.«

»Kaj vi, herezuloj?«

»Eĉ ni batalas por afero de nia religio. Kaj ni estas venintaj tien ĉi Baselon, paroli por afero de nia religio, laŭ la Sankta Skribo kaj la Sanktaj Patroj.«

Kaj ree laceco sidiĝis sub okulojn de Prokopo kaj profundigis bluetajn striojn sub pezaj okulsaketoj: »Ni estas lacigitaj per la luktado kaj ni scias, ke la Sinjoro bedaŭras la kristanan sangon. Ni volas konvinki la kristanaron pri nia vero, kiel venis konvikadi en Konstancon Majstro Johano. Ni scias, ke ni estas malmultaj, manpleno. Mi estas el tiuj, kiuj permesis venĝon kaj teruron, por ke estu skuata konscienco de potenculoj. Mi estas tiu, kiu mortos pro la vero, sed pli frue mi alportos ĝian pruvon laŭ la Skribo. Infano, mi scias multon. Multe mi preĝis, multe da sango fluis ĉirkaŭ mi, multe da brulegoj lumis sur miaj vojoj al Dia vero. Ni eble pereos, sed ne kiel herezuloj. Ni konvinkos, ni pruvos, ne kiel akuzitoj sed kiel atestantoj de la vero!«

Kaj mallaŭte li aldonis:

»Por savo de la homaro, por Dia vero kaj paco de l' animo de ĉia patro eĉ por paco ĉia, filol!«

Mi starigis. Mi kaŝis la ponardon, kiun mi ĝis tiu momento tenis firme en la mano kaj mi riverencis al la pastro Prokopo. Pastro Prokopo rektiĝis en sia tuta alteco kaj ekparolis benante: »Pax Tecum!«

Hodiaŭ, en la tago de centa naskiĝtago de la malaperinta patro, rememoras mi, Georgo Aari el Aarenburg, profesoro Basela, la neforgeblan okazintaĵon el mia junaĝo. Mi sidas inter miaj libroj, mi aŭdas en la domo voĉojn de miaj nepoj, mi rigardas la negran emblemon de mia familio sur la muro kaj mi anime perceptas la grandan ĉirkaŭiron de la mondo. Morta estas la pastro Prokopo, mortaj kardinaloj kaj teologoj el la koncilio, ne estas herezuloj en Bohemio, sed nur idoj de l' eklezio, ne estas paco sur la tero, la homoj serĉas plue kaj torturas sin pro novaj veroj, novaj sonĝoj, kiujn Dio volonte sendas al la suferantoj kaj malriĉuloj.

(Aperis en jaro 1940.)

Tradakis Stan. Kamarýt.



das Zd. A. Blažek, advokata ofi-

cisto.  
**Moravská Ostrava.** E. Klubo disvolvis ampleksan agadon jam en junio kaj baldaŭ povis vidiĝi rezultojn de sia agado. La plej granda estas esperantlingvaj disaŭdigoj el Mor. Ostrava ĉiun mardon je 22.20. La stacio estas tre bone aŭdebla precipe en Balkana duoninsulo, en Jugoslavio, Bulgarujo, Rumanujo, Albanujo, Grekujo, Turkujo, Sirio, Palestino sed ankaŭ en USSS kaj Polujo, Luzacio. La disaŭdigo donas politikajn, kulturajn kaj ekonomiajn sciigojn pri nia lando kaj nacio

precipe pri eroj kiuj kontaktas kun la Ostrava-regiono. La klubo informas siajn anojn pri la agado per tre instigaj cirkuleroj. La societa vivo de la klubo estas tre vigla. La biblioteko, kiu estis kaŝita ĉe membroj, estas kunmetata kaj estos publikigita listo de disponeblaj libroj. La klubo kunvenas ĉiun merkredon en kafejo Fenix je la 19.30. Prez. estas Vlad. Slaný, Vítkovice, Třebízského Vlad. Slaný, Vítkovice, Třebízského K. Klimkovic ve Sl. 182.

**Nýrsko.** Kurso en ŬRO-Labor-Lernejo komencis en oktobro.  
**Olomouc.** La Esperantista societo



restarigis sian vivon la 11-an de junio 1945. Ĝi kunvenas ĉiun merkredon je la 19 horo por modesta amuzado, babilado, kantado, rakontado, recitado. Ĝi preparas restarigon de la memorŝtono en urba parko. La Esperanto-Arbo kreskas kaj prosperas, ĝin forgesis la germanoj forigi. Ĝen. kunveno okazis la 21-an de septembro. La kurso en ŪRO-Labor-Lernejo komencis en oktobro. Prezidanto de la societo estas Albin Neuzil, ekslernejestro en Olomouc, Nové Sady, Husitská 12.

**Pardubice.** Esperantista Klubo Dro Schulhof reviviĝis en septembro. La unuan kunvenon partoprenis 26 p. Prezidanto estas Old. Zeman (Havličkova 850), sekretario St. Borovka.

**Plzeň.** La klubo kunvenas depost junio en Městanská beseda ĉiun sabatojn je la 20 horo. Ĝi daŭrigas en sia organizado de la tuta regiono sub titolo «*Okcideohemiaj Esperantistoj*». Ankoraŭ dum ĉeesto de la amerika armeo en la urbo ĝi pendigis en la urbo afiŝojn ĉeĥa-esperantlingvaj kun stelo kaj granda vorto Esperanto. La klubo preparis tekston por propaganda flugfolio, kiu estas eldonota. Kurso en la loka ŪRO-Laborlernejo dum vintro 1945/46 estis organizita kun oferema helpo de loka esperantistaro.

**Poličná ĉe Val. Mez.** Kurson komenculan por 18 p. gvidas depost komenco de novembro Vilém Šob, fotografo en Val. Meziříčí. La ejo estas en lia laborejo. Pro manko de lernolibroj la kursgvidanto multobligas la tekstojn el Kilián-lernolibro.

**Praha.** Esperantista Klubo havis dum la Protektorato lastan ĝen. kunvenon la 14. VI. 1940. Estis elektita jena komitato: Prez. Jar. Šustr, vicprez. K. Koutek, sekretario F. Sviták, kasisitino Bárochová, bibliotekisto Slanina, revuistino Hořinová, arĥivisto Bároch, protokolistino Boháčová. La germana subpremado kaŭzis iom post iom malaperadon de ĉiu publika agado de la klubo, la kunvenoj en la klubejo ĉesis kaj kunvenadis sole en la kafejo malgranda areto de esperantistoj kun la prezidanto, malofte dek, iam sole du-tri homoj. Tamen la gestapo venis en fino de la jaro 1943 spionadi ĉu esperantistoj kunvenas kaj kun akuzo de la prezidanto, kial la klubo ne likvidiĝis, kiam tamen esperanto estas malpermesita. Tiam prezidanto Šustr anoncis al la polico likvidiĝen de la klubo (la 20-an de februaro 1944) kaj prezentis al la gestapo nomaron de biblioteko kaj konfirmon,

ke la mona havaĵo de la klubo estis laŭ la statuto sendita al Ústřední matice školská. La nomaro de biblioteko estis nekompleta, la plej gravaj libroj estis donitaj al kelkaj klubanoj por konservi ilin. La kunvenoj de fidela areto ne ĉesis. Oni gardis la bibliotekon, kiu estas siaspeca unikaĵo en la mondo enhavante multajn librojn tre maloftajn el la unua periodo de nia movado. La gestapo trankviliĝis kaj ne plu malkvietigadis la lastajn fidelulojn. Meritas apartan dankon s-o Šustr, kiu pro persona saĝo kaj kuraĝo ebligis konservon de la klubaj havaĵoj kaj tradicio. Post la liberigo de la nacio en majo 1945 tuj komencis la areto labori pri revivigo de la Klubo kaj la Asocio. Permeso por renovigo de la klubo agado estis donita de la Loka Nacia Komitato Praha I-VIII jam en junio. La unua kunveno klubo okazis la 20-an de junio 1945 kaj depost tiam ili okazas ĉiun merkredon en la tradicia klubejo de la kafejo Louvre, Praha I, Národní tř. 20. La klubo liveris kunlaborantojn por Radio, Asocia komitato, instruado en la Laborlernejo-kursoj. El diskutoj kaj raportoj en la kunvenoj eliris pluraj gravaj iniciatoj. El teroj de la preloj estu cititaj por ekzemplo: Pri historio de la Klubo dum okupado kaj promesoj por la nova epoko (Šustr), Radio-disaŭdigoj, organizo, raportoj, informoj pri resonado (Malík, Hromada, Slanina, Forge), prezento de mallarĝaj filmoj (Slanina), Rakontado pri spertoj inter esperantistoj en fremdlando (Forge, Hebký), Labor-Lernejo-kursoj (Šolc, Slanina, Mařík, Forge), Agado esperantista kaj novaĵoj (Šustr), Pri renovigo de la Asocia agado (Kamarýt), Pri stato de IEL post la milito (Šustr), Homaranismo (Jandík), Esperanto dum la milito (Šupichová), Dua milito de fidoj (Echtner). Informado pri ĉ. preso kaj Esperanto (Mařík). En la jaro 1945 estis 30 kunvenoj, kiujn vizitis sume 1126 membroj, 111 gastoj, 29 fremduloj. Meznombro de vizitantoj estas 40 personoj. Krome la klubo organizis 2 ekskursojn en urbon Sobotka por viziti kurson de s-o Šolc. La jarkunveno okazis 16-an de januaro 1946. Ĉeestis 73 p. Nombro de membroj ĝis tiu ĉi dato estis 360. En tiu nombro estas 180 el Praha, 180 ekster Praha. Prezidanto estis elektita denove Jar. Šustr, sekretario F. Sviták.

**Prostějov.** Esperantista klubo post altrudita sesjara paŭzo anoncas sian

por vivo kaj havis sian starigan kunvenon la 11-an de oktobro 1945. Regularaj kunvenoj ĉiujaŭde en Lidový dům. Prezidanto Stanislav Jefábek (placo de Dro. Edvard Beneš 9), sekretario Svatopluk Chytil (Žižka-placo 6). Kurso komencis 6. XII. 1945. Nova komencula kurso estis malfermita la 12-an de februaro. Samtempe komencis kurso por progresintoj. La kursojn aranĝas kune la Klubo kaj la Asocio de ĉeĥa junularo (Svaz české mládeže) en la Junulara domo. Kurskotizo 50 Kčs. Al la kursoj invitadis grandaj afiŝoj.

**Pržno (p. Jablunka).** Kurson por skoltoj gvidas de decembro T. Machala.

**Radvanice.** Esperantista klubo NOVVA VIVO okazigis sian sepan (unuan postmilitan) ĝeneralan kunvenon la 24-an de februaro 1946. Estis elektitaj: prezidanto Jan Taraba, vicprezidanto Josef Hanzelka, sekretario Adolf Staňura, kasisto Josef Dvořáček. Domo de fajrobrigadistoj estas nova kunveno de la klubo. La plej proksima monata kunveno okazos la 24-an marto. - Ĉe la unua postmilita kongreso de EACSR la klubo estis reprezentata de s-o Vlad. Slaný, Vítkovice. - La klubo propaganda kesteto estas denove elpendigita ĉe la ĉefa strato.

**Sobotka.** La Csehmetode gvidita kurso de ŝtate ekzamenita instruisto s-o Karel Šolc finis kun bonega sukceso: 24 novaj, bone parolantaj gesperantistoj pligrandigis niajn viccojn. — Sabate la 20-an de oktobro okazis solena finiĝo de la kurso, kiun krom la diligentaj gelernantoj vizitis ankaŭ gastoj el Mladá Boleslav, Dolní Bousov kaj el Praha. Nian Asocion oficiale reprezentis prezidanto de Esperantista Klubo en Praha Jar. Šustr. Ĉeesto de pola samideano konata verkisto Jean Forge, kaj franca samideano Yvone de Pétry donis al la festo karakteron de internacia kunveno. Estis fondita loka grupo kun jenaj funkcioj: Prez. Karel Pulcman (Jičínská 199), vicprez. Hela Holanová, sekr. Mil. Pelcová (Jičínská 198). Ĉiuj 24 kursoj aliĝis.

**Tábor.** Loka grupo estas fondita. Esperantistoj el la urbo kaj ĉirkaŭaĵo turnu sin al s-o Inĝ. L. Krajic, Jeronýmova 1984.

**Třebíč.** La Laborula komitato de Komerca Akademio en Třebíč proponis al ministerio de instr. enkonduki Esperanton en komercajn akademiujn kaj komercajn lernejojn.

## Kroniko enlanda.

*Kurstina festo en Mladá Boleslav*, kiu post sukcesa finiĝo de Csemetodaj kursoj gviditaj de senlaca instruisto s-o K. Šolc okazis la 26-an de januaro, sabate vespere en Grandhotelo, kunvenigis ĉirkaŭ 80 geesperantistojn el la urbo mem kaj el pli aŭ malpli proksima ĉirkaŭaĵo.

La kunveno, kiun ĉeestis oficialaj reprezentantoj de Praha, Hradec Králové, Mnichovo Hradiště, Sobotka, Turnov kaj aliaj lokoj sendis salutan telegramon al prezidento de la respubliko dro Edvard Beneš. Oni rememoris la viktimojn de germana okupado, inter kiuj troviĝis ankaŭ meritplena loka kuracisto kaj prezidanto de E. K. Dro Marek, ĉeestanta malnova pioniro de la movado s-o J. Moucha okaze de sia 70 jara vivjubileo estis honorigita per donaco de unu ekzemplero de ne plu acetebla Ĉeĥoslovaka antologio.

Tre agrabla medio, plaĉa kaj riĉa programo, multaj kantoj kantataj de unuopuloj, grupetoj, aŭ de tuta ĉeestantaro, kaj aliaj plaĉaj aranĝoj kaŭzis, ke la partoprenintoj de tiu-ĉi »kongreseto« ankoraŭ je la unua horo post la noktomezo sidis en amika babilado.

*Ligo de katolikaj esperantistoj* en ĈSR renoviĝis sian agadon kaj aperigis la 23-an de septembro unuan ciklostilitan cirkuleron, kaj la 6-an de oktobro duan. Ili rekomendas varban agadon kaj restarigon de la lokaj grupoj. La dua cirkulero sciigas, ke anoncis sin jam cent membroj. Prezidantino estas L. Dandová, prov. sekretario Jan Cigánek en Praha, Hloubětín, Liblická 14. Ni salutas revivigon de katolika ligo kaj deziras al ĝia klopodado pluaĵn sukcesojn.

*Labor-lernejo de Centra Estraro Sindikata (ŬRO) en Praha* en kunlaboro kun Esperantista Klubo aranĝis grandskalan Esperanto-kurson. Samideano Antonín Slanina estis komisiito de la Klubo kiel interligilo kun ŬRO kaj dank' al samideano Staněk li sukcesis organizi tre grandan kurson. Antaŭ la provleciono estis instalita Esperanto-ekspozicio en granda montrofenestro en ĉefstrato Příkopy. Materialon disponigis samideanoj Václav Král kaj Jaroslav Šustr. Ekspozicio vekis grandan intereson ĉe publiko. Antaŭ la montrofenestro staris ĉiam multegaj interesuloj.

La 22-an de novembro 1945 okazis provleciono de Jean Forge. Partoprenis ĝin pli ol 300 personoj. En kurson enskribiĝis 200 personoj. Kurso estis dividita je kvar partoj. S-o Jean Forge instruis laŭ ĉe-metodo. Al li helpas s-oj Ant. Slanina kaj Václav Král. ŬRO aranĝos baldaŭ novan kurson, ĉar venas ĉiam novaj lernontoj.

*Aktoroj kaj aktorinoj de »Rozmarné divadlo«* en Praha (direktoro J. Snížek) lernas Esperanton. Instruas Ant. Slanina.

*Esperanto oficiale en slovakaj komercaj lernejoj.* La Komisiito de la Slovaka Nacia Konsilantaro por instruado kaj klerigo en Bratislava aperigis dekreton datumitan 4-an de marto 1946 kun sekva teksto:

Temas: Komercaj lernejoj, enkonduko de Esperanto.

Al direktoj de komercaj lernejoj,

Mi permesas, ke en komercaj lernejoj, en kiuj estas trovebla taŭga instruonto kaj konstatebla intereso ĉe studantaro, estu enkondukita instruado de internacia lingvo Esperanto kiel laŭvola fako.

En komercaj akademioj oni povas krei lingvan studrondon el studentoj de la dua kaj tria klaso, en komercaj lernejoj el la dua klaso.

La studrondoj povas havi maksimume 25, minimume 10 studentojn. La instruado povas daŭri maksimume 1 lernejan jaron po du horoj semajne. Ĝi povas esti dividita en du semestrojn sinsekvajn ankaŭ ekster la sama lernejjaro.

En la lernejjaro 1945/46 la instruado povas komenci eĉ depost 1-a de aprilo 1946.

Por la komisiito: Lichner.

La instruado jam komencis en Komerca akademio en Trenčín, kie instruas profesoroj de la akademio Jar. Procházka kaj J. Mistrík en kvar studrondoj po 20—25 studentoj, kaj en Komerca akademio en Bratislava, kie instruas prof. Vlado Jukl 30 studentojn. La slovakaj komisiito por instruado sinjoro Laco Novomeský akceptu nian dankon pro sia larĝvida decido.

*En Slovaka komerca altlernejo en Bratislava* komencis oficiala instruado de Esperanto en somera semestro 1945/46. Lektoro estas ŝatata samideano, eminenta tradukanto kaj funde konanto de la lingvo *Pavel Rosa*, direktoro de Ĝenerala pensia instituto en Bratislava. Kron li estu ĉe tiu ĉi okazo salutata rektoro de tiu altlernejo profesoro Cívárek, kies kompreno pri graveco de la lingvoproblemo multe helpis en tiu ĉi grava aranĝo.

### Deklaro pri Esperanto

por esti prezentita de IEL al

### Unuigitaj Nacioj

estos dissendata dum aprilo.

Zorgu, ke multaj subskribu, kaj resendu baldaŭ! Se Vi ne ricevos, petu la foliojn subskribotajn de la Asocio en Praha 47.

*Esperantista Slovaka - Slovenský esperantista* komencis aperadi en Žilina, eldonata de Edicio de I. Roveroj-skoltoj. Ĝi estas »gazeto de slovakaj esperantistaro kaj skoltaro esperantista«. Fondis kaj eldonis Ernest Váňa. Aperas provizore monate. Prezo 2 internaciaj respondkuponoj poŝtaj. Redakcio kaj administracio en Žilina, Pivovarská 3. La unua kajero aperinta en komenco de aprilo estas numero 1—2, tre bela broŝuro 40-paĝa slovak- kaj esperant-lingva, kun ilustraĵoj (du reproduktaĵoj de M. Benka, du folkloraj ĉambroanguloj), multaj temoj pri skoltaro kaj skoltismo, komenco de elementa kurso, ĝenerale tre bela impresio. Tre plaĉis al ni artikoloj Tusilaĝo kaj Urtiko. Ni salutas ĝoje nian kunbatalanton en sfero de slovakaj lingvoj kaj deziras al ĝia klopodado plej bonan sukceson.

*En Slovakujo* ĝojige kreskas intereso pri Esperanto. Aperas novaj homoj vidigantaj neatendite bonan scion de la lingvo, kaj plenaj de juneca elano. La Esperanto-Klubo en Bratislava, unu el la plej viglaj niaj kluboj antaŭ la milito, transformiĝas en centron de esperantistoj slovakaj. La 28-an de aprilo kunvenos en Bratislava fonda kunveno de *Slovaka Esperanta Societo - Slovenské Esperantistické Sdruženie* (SES). Ĝia ejo estas en oficejo de Skolta Centro en Bratislava Štefánik-strato 6 c. La fonda kunveno fariĝos grava manifestacio de slovakaj esperantistoj. Estos aranĝita ekspozicio, oni disaŭdigos la informon en Radio k. t. p. Ni

atentigas niajn legantojn en Slovakujo pri tiu ĉi grava entrepreno kaj deziras al slovakaj fratoj brilan sukceson. Ekzisto de memstara centro por Slovakujo en Bratislava estas nepre bezona kaj rezultas el nova jura konsisto de nia ŝtato. Informojn donas samideano Duriaĉ en Bratislava, Jesenského 78.

*Esperanto-fako en la Muzea biblioteko en Praha*, starigita de mortinta direktoro de la biblioteko Dr Jos. Volf, devis esti dum la milito laŭ ordono de germanoj transportita el sia ejo kaj provizore ankoraŭ ne estas trovita, ĉar la Muzeon trafis ankaŭ bombo. Sed laŭ informo de muzea oficisto s-o RNDr VI. Závorka estas espero, ke ĝi estos trovita kaj denove instalita.

*Muzika vespero por rememorigi Zamenhof la 15-an de decembro 1945* okazigita de Esperantista klubo en Brno en luksa Spěgulčambro de hotelo Passage bele ornamita de s-o Adolf Nečas havis tre altan nivelon Jen la programo: Prelego de prof. inĝ. *Vincenc Kroužil*: Zamenhof kaj interna ideo estis legita de Dro M. Štefánek. *Henri Vieuxtemps*: Koncerto No IV, op. 31. *Andante-Moderato*. *Bedřich Smetana*: Alaŭdkanto el opero La kiso. *Joh. Svendsen*: Romanco, op. 26. *Fr. Schubert*: La abelo, op. 13. *K. Kovařovic*: Slovaka kanto. *Ant. Dvořák*: Sonatino, op. 100. *Allegro risoluto-Larghetto-Allegro*. »Kiam la patrino«. *Vítězslav Novák*: Timena Nána. *Pablo de Sarasate*: Fantazio je la opero Faust de Gounod. Violonis la juna virtuozo *Jan Geryk*, kantis ĉarma kantistino *Liběna Opletalová*, piane akompanis *B. Vavruša* ĉe kantoj, *E. Křepelka* ĉe violono. La arto de Geryk kulminis en prezento de Sarasate-fantazio. La voĉo de la juna kantistino ravis ĉiujn aŭskultantojn. La artistoj rikoltis entuziasman aplaŭdon pro ĉiuj prezentaĵoj. La invitiloj al la koncerto enhavis bildon de Zamenhof, la tre belaj programoj enhavis bildon de J. Geryk kaj ĉefajn kaj esperantlingvajn tekstojn de la kantoj. La tradukoj estas de Fr. Sýkora kaj de J. Geryk. La artistoj de la koncerto kaj la klubo de Brno ricevu dankon pro la sindono, kiun ili dediĉis al tiom reprezenta entrepreno.

*Letero de samideano iam M. Novosad*. Pluraj niaj legantoj rememoros lin. Li vivis siatempe en Vizovice, poste en Bratislava, vizitis Berlinon, edziĝis kaj maledziĝis, vivis en Trnava, aliĝis al budhismo kaj en jaro 1938 elmigris en insulon Ceylon, kie li estis akceptita kiel »samanevo« en budhanan monaĥejon en »Hermitage Island« en Dodanduwa en marto 1938 kaj akceptis nomon Nyanasatta. Nun venis de li poŝtkarto al s-o J. Řebíček en Olomouc datumita la 27. XII. 1945, en kiu la nuna Rev. C. Nyanasatta en »Kolaten-Hermitage« en Bandarawela skribas:

Post la forpaso de Mondmilito mi rekomencas mian Esperanto-korespondadon per la poŝtkarto al Vi. Kiel Vi fartis dum la lastaj ses jaroj? Mi estas feliĉa, ke mi povas informi ĉiujn miajn Ĉeĥoslovakajn kaj internaciajn amikojn, ke mi vivis feliĉe kaj kiel liberulo, spite la malamikan okupon de ĈSR. Mia estraro kaj la registaro ne malhelpis mian liberecan vivon kaj agadon. La tempon mi pasigis utile per plua studado, instruado, paroladoj, prelegoj kaj predikoj. Duonjaron mi eĉ estis regula instruisto de kelkaj fakoj en angla-lingva gimnazio. Pro milito profesoroj kaj instruistoj malsufiĉis. Nune mi havas kvazaŭ privatan lernejon kun 20 lernantoj inter 8—20 jaroj. Krom la anglan mi ankaŭ instruas la lingvon de la popolo: la sinhalan. Mi prelegas, parolas kaj predikas angle kaj sinhale. La unuajn 5 jarojn mi prelegis angle kaj uzis interpretistojn, nun mi ne bezonas tradukiston. Mia vivo estas feliĉa, aktiva kaj kontemplativa. Mia sano estas bona. Kia estas la Esperanto-vivo nun? Mi intencas verki lernolibrojn kaj legolibrojn por nia popolo ĉi tie kaj komenci publikan instruadon de Esperanto, simile al Cseh-pastro. Mi varbis kelkajn monaĥojn kaj instruis ilin. Se mi vivos, iun tagon vi aŭdos Esperanto-predikon de l' Colomba stacio. Korajn salutojn al vi kaj al ĉiuj amikoj! Vi faros grandan servon al Esperanto kaj mi, se vi publikigos mallongan anoncon en Ligilo, Progreso, Esperanto, Heroldo ktp. pri la enhavo de mia karto. Mi ne povas trovi la precizan adreson de l' redakcioj kaj miaj Esperanto-amikoj, al kiuj mi ne respondis dum la ses jaroj. Kie estas Prof. M. Lukáš kaj Dr St. Kamarýt? Fartu bone! — Kun koraj salutoj via sindona C. Nyanasatta.

*Kursina festo en Hradec Králové* okazis la 16-an de marto dum la ĉeesto de pli ol 80 personoj el 16 lokoj. Ĝi estis bela kaj plaĉa apotezo al Cseemetoda kurso sukcese gvidita de malnova pioniro s-o Frant. Pytloun. Multaj el la ĉeestantoj alparolis la kunvenegon, kiun malfermis dro Alfred Weiner. Por la Asocio salutis sekretario Hiža, por ĝia radiokomisiono s-o Slanina, kiu parolis pri la novaĵoj en radio, en la nomo de E. K. Praha parolis ĝia prezidanto Šustr, kiu sciigis multajn novaĵojn el la tuta mondo. Dro Fousek en bela parolo instigis al perfekteco en esperanto, precipe pri ĝusta akcento. — Elokventan kaj belan parolon motivitan de interna ideo de esperanto, parolon plenan da fajro kaj granda entuziasmo direktis al la kursanoj prof. Miloš Lukáš. Plie parolis s-o Špūr el Doksy, s-ino Veverková el Pardubice, Pa-biška el Sobotka, Munzar el Hořice kaj multaj aliaj. Riĉa amuza programo kaj reganta tre agrabla amika atmosfero kulpis, ke je la dua post la noktomezo oni ankoraŭ gaje kantis gvidate de lokaj kantemaj samideaninoj.

## Ni ne forgesos la mortintojn!

*Josef Vávrouský*, tre aktiva esperantisto konata precipe pro sia agado en policaj rondoj, ĝendarma ĉefserĝento en pensio en Praha, mortis la 20-an de marto 1946 pro apopleksio, 67-jara. Li laboris persiste dum

multaj jaroj inter policanoj kaj estis internacie konata vizitante ofte kongresojn kaj kunvenojn. Li studis helpe de Esperanto kriminologion precipe en Danujo, Polujo, Francujo, kaj havis en tiuj landoj multajn amikojn. Li estis tre aktiva membro de Polica Esperanto-Rondeto en Praha kaj gvidis multajn kursojn por policanoj en Praha. Entombigita li estis la 28-an



de marto. Ĉeestis la funebran feston areto de Esperantistoj, E. Klubo de Praha kaj Polica E-Rondeto metis florkronojn kaj prezidanto de E. Klubo J. Šustr adiaŭis la mortinton per vortoj kortuŝaj. Lian morton sciigis E-disaŭdigo en la tago de entombigo per mallonga ondo je la 23-a horo. (J. Mařík.)

#### *Sur batalejo:*

*Oldřich Helma*, aktivulo el Brno, foriris ekster landlimojn kiel aviadisto kaj plenumante taskojn de sia batalado heroa por sia nacio estis forpafita dum flugo el Germanujo Anglujon. Li falis en maron apud angla bordo, estis trovita kaj kremaciita en Anglujo. La 7-an de julio 1941 li estis enterigita en tombejo en Salisbury. Li estis ĉefserĝento kaj posedis medalon pro kuraĝo kaj ĉeĥoslovakana militan krucon.

#### *En germanaj koncentrejoj kaj arestejoj:*

*Robert Bloch*, sekretario en poŝta ministerio en Praha, ĉiam tre aktiva esperantisto, lasta ĝenerala sekretario de nia Asocio, depost la jaro 1936, ĉiam tre aktiva kaj servema samideano, homo kiu neniam forgesis helpi al esperantisto, kiu ĉiam proponis sin servi kaj kiu koleris, se oni ne sufiĉe rapide akceptadis la servojn de li proponatajn, ne revenis el koncentrejo en Osvieĉim. Ankaŭ lia edzino, esperantistino dediĉinta sin al nia ideo kun la sama oferemo kiel lia edzo, ne revenis. Bloch laboris precipe en sfero de individua varbado inter indiferentuloj. Li estis konata en la tuta mondo esperantista, ĉar li tre ŝatis gvidi grupojn esperantistajn dum kunvenoj kaj kongresoj. Kie flirts flageto kun stelo, tie estis aŭdebla kaj videbla Bloch. Estis en liaj animo kaj korpo vivemo kaj viveblo neoftaj. Kaj nun nek tago de lia morto, nek loko de lia tombo estas troveblaj. Ankaŭ tio atestas pri malnoblecigo de la germanaj murdistoj.

*MUDr Karel Marek*, fondinto kaj multjara prezidanto de Esperantista Klubo en Mladá Boleslav, naskiĝinta en Pelhřimov 1896. Praktika kuracisto en Ml. Boleslav depost 1923 fariĝis baldaŭ la centra persono en la agema klubo, kiun li fondis kun prof. Kožený, propagandis senlace kaj fervore Esperanton precipe inter la kuracistaro, skribis artikolojn en Kuracista Revuo ktp. Tre ŝatata kiel kuracisto en la urbo li gajnis multajn adeptojn al nia movado. Partoprenis la universalan kongreson en Wien. Gestapo malliberigis lin en 1941 kiel membron de kontraŭleĝa grupo. Li estis kondamnita kaj mortis 1943 en malsanulejo Moabit apud Berlino sekve nekuracata karbunkulo. Ne forgesu: mortadis kuracisto plene konscia pri sekvo de nekuracata karbunkulo! Bona homo, bona ĉeĥo, bona samideano.

*Inĝeniero Antonín Slavík* estis direktoro de Radio-stacio en Brno kaj estas precipe lia merito, ke el Brno estiĝis »Verda stacio«. Ankaŭ li estis de germanoj murdita. Li estis arestita samtempe kun siaj amikoj univ. prof. D-ro. V. Helfert, univ. prof. D-ro. J. Uher k. notario Jaroš pro sia revolucia agado, ia 14. 12. 1939. En la j. 1943 li estis kondamnita al la morto, transportita al Plötzensee, kie li ankoraŭ 5 monatojn vivis en nepriskribeblaj suferoj k. en atendado de l' morto. En tiuj 5 monatoj travivas inĝ. Slavík en pensoj sian tutan vivon k. kiam oni al li 14 tagojn antaŭ la ekzekuto transdonas pro speciala graco maldikan kajereton, en kiun li povas enskribi ĉion, kio

estas direnda al tiuj, kiuj vane lin atendas, li enskribas sur ĉi tiujn paĝojn ĉiujn siajn pensojn. Li rememoras la j. 1925, kiam li iĝis direktoro de Brna radio-stacio. Tiun tagon plenumiĝis lia plej arda deziro, esti pioniro, konstruanto k. mova forto de l' disaŭdiga arto laŭ flankoj teknika k. programa. Li konsciis, ke li ekdejaras sur posteno respondeca, ekipita nur de scioj teknikaj k. administraj. Por povi esti aŭtoritato ankaŭ en problemoj programaj, li enskribiĝas en universitaton, studas filozofion, historion de l' arto, literaturon, belartojn k. ĉe tio laboras en la disaŭdigo entuziasme k. kun plena amo. En la kajero li rememoras la unuajn malsukcesajn, sed konstante pionirajn provojn por plibonigi teknikajn aranĝojn k. programojn, rememoras siajn kunlaborantojn, kiuj laŭ lia ekzemplo laboris kun la sama fervoro por plialtigi nivelon de brna radio-stacio. Sur lastaj paĝoj de l' kajero, kelkajn tagojn antaŭ la morto, li gajigas sin per rememoroj k. nur bedaŭras, ke ne estas al li destinite pli...

La 27. 10. iris inĝ. Slavík al ekzekutejo. Li estis unu el tiuj grandaj homoj, kiuj brave akceptis sian sorton k. feliĉan estonton.

El letero de inĝ. Ant. Slavík al liaj kunlaborantoj: »Post longa silento mi denove aŭdiĝas, bedaŭrinde la lastan fojon. Dio volas, ke mi ne revenu. K. mi obe k. sindone plenumas Lian volon. Miajn lastajn pensojn mi dividas inter miajn familion, amikojn k. Vin, miajn amikojn-kunlaborantojn. Vi estis parto de mia vivo, mia amo, mia zorgo k. ĝojo, sed ĉefe ĝojo, ĉar vivi k. labori kun Vi estis por mi vera plezuro k. bezono. Nia labora kooperero estis io, kio donadis al nia vivo pli altan sencon k. konsekron, tiel sentis mi mem k. Vi certe la samon. Mi bedaŭras, ke pro interveno de l' sorto ĉi ĝojiga kooperero estas interrompita, sed mi esperas, ke ĝia spirito plu vivos k. en ĝi la rememoro je mi, same kiel mi ĝis la lasta momento rememoras Vin — — —«

*Tonča Mrázková*, vivinta en familio de s-o J. Řebíček en Olomouc, fraŭlino, kies koro daŭre brulis pro idealo ne komplete difinita sed despli adorata, idealo de servo kaj ofero. Tiaj homoj plibonigas situacion de homaro. Tiajn homojn la germanoj plej volonte kaptadis. Ankaŭ Tonča Mrázková estis kaptita kaj mortturmentita en koncentrejo. Mankas detaloj. Mankas datoj. Certa estas la morto 25. IX. 1942. Kaj la resto estas la silento.

*Josef Raška*, librotenisto en Příbor, iam nelacigebla laboranto en Ostrava-regiono nask. 7. III. 1906. Arestita la 16-an de aŭgusto 1941 pro sekreta defenda movado kaj arestata en Nový Jičín, Mor. Ostrava, Opava, Mírov, Breslau, kie li estis post longa turmentado ekzekutita la 16-an de aprilo 1943.

*Jaroslav Benda* el České Budějovice, ekzekutita en Tábor.

*Marie Krousová* el České Budějovice, ekzekutita en Tábor.

*Stanislav Malý*, faka instruisto, prezidanto de Esperantista grupo en Mnichovo Hradiště.

*Jaromír Rybářik* el Domažlice.

*Josef Šafránek* el České Budějovice, mortis en Dachau post 18 monata karcerado.

*Miroslav Vajsar* nask. 2-an de oktobro 1919 en Česká Lípa, membro de E-Klubo en Hradec Králové, turmentmurdata en Terezín la 2-an de majo 1945.

## *Dum silentado sub germanoj:*

*Rudolf Fridrich*, pioniro de la unua epoko. Li naskiĝis la 15-an de septembro 1878 en Wien, studis gimnazion en Třeboň, Ĉ. Budějovice, Jindřichův Hradec, universitaton en Praha, fariĝis profesoro de la ĉeĥa kaj franca lingvoj kaj profesoris en gimnazioj Třeboň, Prostějov, Brno-Královo Pole, kie li fariĝis direktoro en jaro 1926. Pensiigita li estis en 1938 kaj vivis poste en Pardubice kie li mortis la 20-an de novembro 1944. Aktiva esperantisto li fariĝis jam en jaro 1905 kaj partoprenis tiaman esperantistan vivon precipe tradukante ĉeĥajn beletristikaĵojn. Li sciis la lingvon tre funde kaj liaj tradukaĵoj signifis en sia tempo kuraĝan kaj saĝan paŝon sur kampo plugata tiam ankoraŭ de nespertuloj. Li klopodis redoni eĉ ritmon de originalo, iam tre sprite. La plej granda lia traduko estas Benedek de Machar, kiu aperis ankaŭ libroforme en j. 1913. Depost jaro 1921 li estis dum pluraj jaroj prezidanto de Esperantosekcio ĉe Centra societo de ĉeĥoslovakaj profesoroj. En sia gimnazio li dum pluraj sinsekvaj jaroj instruis Esperanton oficiale kiel laŭvolan fakon kaj provis eksperimente mezuri la rezultatojn instruajn kompare kun tiuj en la alia fremda lingvo. En jaro 1913 li redaktis propagandan gazeton *Kulturo*. De 1920—1924 li klopodis kunigi esperantistojn de malgrandaj nacioj por komune pledi por rajteĝalo. Artikolojn pri tiu temo li publikigis precipe en Nova Eŭropo kaj Progreso. La sulko, kiun faris Fridrich sur kampo esperantista, ne perdiĝos. Lia laboro ne estos forgesita.

*Jan Rambousek*, generalo en pensio, mortis la 3-an de novembro 1945 en České Budějovice, kie li vivis dum multaj jaroj kiel pensiulo, 78-jara. Dum multaj jaroj li estis fidela membro de E. Klubo en Ĉ. Budějovice, kiun li ofte tre ofere gvidis. Kun li forpasis esperantisto tre fidela al nia idealo. Dum jardekoj li estis fidela membro de Internacia Scienca Asocio Esperantista. La lokaj esperantistoj partoprenis ĉe la funebra festo.

*Sidonie Dlouhá*, unu el virinaj pioniroj esperantistaj, prezidantino de Rondeto de esperantistinoj, membrino de Prepara Komitato de la XIII-a kongreso en Praha. (9. VIII. 1940).

*Klementina Hlaváčová*, ĉiam komplezema laborantino en Rondeto de Esperantistinoj (23. V. 1942).

*Marie Jandlová* en Uherské Hradiště (9. IX. 1942).

*Vojtěch Hradil*, profesoro en Brno.

*Jindřich Horák*, lokomotivestro en Střelice ĉe Brno.

*Berta Keyzlarová*, en Ĉev. Kostelec. Daŭre aktiva depost la jaro 1910, kiam ŝi transprenis de J. Šupichová lokan E-grupon. Aktoris en Nokto en Karlův Týn dum la kongreso en Praha. (10. II. 1941).

*V. Koc*, Plzeň.

*Božena Morávková*, lernejestrino en Praha, fervora membrino de iama Unua virina societo esperantista en Praha (11. VI. 1944).

*Marie Papíková*, unu el la plej malnovaj membrinoj de la Rondeto de esperantistinoj.

*A. Šulerová*, vicprezidantino de E. grupo en Příbor, en j. 1943.

*F. Volk* el Plzeň.

*Frant. Vrtil*, landa revizoro en Brno.

*Vojtěch Bachman*, lernejestro en Domoradice u Vys. Mýta.

*Josef Brich*, subkolonelo, Praha XIX.

*Václav Broj*, lernejestro, Volduchy, p. Rokycany.

*Richard Cihhart*, bankoficisto, Praha II.

*Vojt. Dvořák*, respiciento, Praha XI.

*Václav Fiala*, Mladé u Bud.

*Josef Heřman*, Losiná, p. Štáhlavy.

*Josef Kárník*, staciestro, Veselí n. M. (7. VII. 1942).

*Rupert Kratochvíl*, instruisto, Veselí n. M.

*Pavel Krupička*, insturisto, Ždánice.

*Julius Lustig*, Korec, p. Pelhřimov.

*Stanislav Malý*, Mnich. Hradiště.

*Jan Mašek*, Stupno u Plzně.

*Jaroslav Sedláček*, Ivančice.

*Bohuslav Straka*, Praha VIII.

*Max Starý*, Plzeň.

*Václav Šibrava*, Debř, p. Josefov Dül.

*Rudolf Telaarík*, Kopřivnice.

Ĉiu el tiuj mortintoj fosis sian sulkon sur kampo de ni ĉiuj prilaborata. Ili foriris kaj neniam revenos. Ĉiu el ili batalis. Perdis kaj gajnis. Perdoj estas forgesitaj. Gajnoj estas heredaĵoj niaj.

---

## *Ni salutu la vivantojn!*

Jen nomaro de tiuj, kiuj travivis germanajn koncentrejojn kaj arestejojn:

*Frant. Březina* el Nové Hamry u Žďáru, estis arestita pro perletera esperantlingva kontakto kun fremdlando, akuzita pro ŝtatperfido kaj spionado, juĝata en Breslau sed pro manko de pruvoj forlasita post ĉirkaŭ unu jaro.

*Josef Buben* el Nĕmčice estis en koncentrejo 21. X. 1940—5. V. 1945. Tiam li estis savita de la Sveda Ruĝa Kruco. En Svedujo li povis bone uzi Esperanton kaj trovis tie multajn bonajn esperantistajn amikojn.

*Rudolf Burda*, nak. 9. IV. 1902 en Plzeň, ano de GEL, arestita la 16-an de marto 1939 pezis 87 kg, reveninte post la liberigo pezis 49 kg.

*Otto Ginz*, multjara gvidinto de Asociaj aferoj, aŭtoro de pluraj verkoj, fondinto kaj organizanto de Gazetara servo, spertulo diversfaka, ankaŭ en la Radio-sfero, oferemulo kaj laborulo, kiajn oni malofte renkontas, travivis en koncentrejo ĉ. unu jaron. Lia filo Petro, 17-jara, ne revenis ankoraŭ.

*Viktor Homola* el Brno estis tie ĉ. 3 jarojn. Reveninte li bezonas kuracadon, tial mankas detaloj pri li.

*Rudolf Hromada*, nia vicprezidanto, multjara ĝenerala sekretario de nia Asocio, eldonanto kaj redaktoro de la Progreso, fakulo en lingvaj demandoj, tradukinto

de kelkaj poemoj kun neordinara sento por poezia delikateco, travivis tie ĉ. kvar jarojn.

*Dr. Hugo Johl*, profesoro el Wien, nune en Tábor, travivis Terezín.

*Václav Kalaba* el České Budějovice, du jarojn en koncentrejo.

*Otto Matzenauer* el Uherské Hradiště.

*Pastro Pokorný* el Nový Jičín travivis la tutan militon en koncentrejo Buchenwald. Estis tie pluraj esperantistoj, kiuj plurfoje kunvenis sekrete.

*Oto Sep* el České Budějovice, ses monatojn en Gestapo-arestejo.

*Richard šedý* el České Budějovice, 33 monatojn.

*Stanislav Žák* el České Budějovice, 36 monatojn.

## Esperanto v cizině.

*Misto prvého poválečného světového kongresu esperantského* není ještě určeno. Na valné schůzi esperantistů švýcarských se mluvilo o Švédsku jako o zemi, jež jej pozve. Také jména Prahy bylo vzpomínáno jakožto města, kde by mohl býti jeden z příštích světových kongresů.

*Esperantské přednášky o republice ve Švédsku.* Ministerstvo informací umožnilo našemu členu p. Josefu Vítkevi, odbornému učitel v Hradci Králové, aby po dohodě s Federací švédských esperantistů odletěl do Švédska, kde se zdrží asi tři měsíce a podnikne švédském cestu s přednáškami o naší republice, provázené světelnými obrazy. Themata přednášek jsou: Československo v letech 1938—45, Československo, kraj a lid, Lidové umění Československa, Československá hudba (s ukázkami na gramofonových deskách). Pan J. Vitek odletěl koncem února. V Praze jsme si koupili počátkem března švédský list s jeho podobiznou a interviewem. Přednášky mají hodně obecenstva i znamenitý úspěch. V dubnovém čísle Svenska Esperanto-Tidningen je zpráva, že J. Vitek přednáší právě ve středním Švédsku a pokračuje v cestě na sever. Do nejsevernějšího místa Kiruna dospěje koncem května.

## RADIO.

La disaŭdigoj okazas daŭre regule laŭ la programo kaj horaro sur nia paĝo 7. La resonado de disaŭdigoj estas tre granda. Ĉiuj aŭskultantoj, kiuj konfirmis aŭdon el 19 landoj, ricevu dankon de la Radiostacioj Praha kaj Moravská Ostrava same kiel la dankon de ni esperantistoj. El tre multaj leteroj ni citu sole sekvajn:

*Alice Früh el St. Gallen en Svisujo*, skribas en marto 1946: Miajn korajn gratulojn pro la radio-relacioj al la agemaj ĉeĥoj! Mi admiras vian prezidenton Beneš. Lia bildo pendas apud mia laborloko en oficejo de la svisa federacia fervojo. Kun intereso mi sekvas viajn energiajn procedojn por atingi 100%-an liberecon. Vi praveĝas!!!

*Justo Boberg el Palmfettsvägen 49, I. ANSKEDE*, en Svedujo skribas la 23-an de oktobro 1945: Unue mi volas gratuli vin pro via nova libereco. Ĉiuj Svedaj esperantistoj ĝojas kun vi. Finfine estas do fino por nacismo kaj faŝismo. La humanaj kaj idealismaj movadoj povas denove internacie labori kaj do ankaŭ nia kara Esperanto-movado. Mi apartenas al estraro de Sveda laborista Asocio kaj volas de ni en estraro esprimi nian koran gratulon al ĉefaj esperantistoj pro dissendoj en ĉeĥa radio. Mi aŭskultas ĉiujn lundojn kaj jaŭdojn el Praha I, kaj el Mor. Ostrava ĉiujn mardojn. Mi aŭdas tre bone. Mia aparato estas sveda (Luxor) 7 lampa. La disaŭdigoj estas nur iomete malfruaj, sed tre interesaj. Ĝis esperanta venko! Nun aŭ neniam. Jes nun!

## Cseh-metoda kursaro en Doksy 21-an - 31-an de julio.

Okazos tri kursoj:

- A. *Komencula*. (Post 10 tagoj Vi fariĝos kapabla konversacii en Esperanto).
- B. *Perfektiga* (gramatiko, frazeologio, literaturo).
- C. *Por kandidatoj de diplomo instruista..*

Instruos:

*K. Šolc*, membro de Cseh-instituto, instruisto de Flandra Ligo Esperantista dum pluraj jaroj, ŝtate ekzamenita instruisto de Esp.

*K. Vrba*, ŝtate ekz. instruisto de Esperanto, partopreninto de kursoj en Hölsinger.

*V. Špür*, ŝtate ekz. instruisto de Esperanto.

Prelegos:

Prezidanto de la Asocio *A. Malik* el Praha, prof. *J. Kožený* el Ml. Boleslav, Asocia sekretario *Jar. Mařík* el Praha kaj aliaj.

*Instruado ĉiutage* de 8-a ĝis 12-a horo.

*Posttagmeze kaj vespere*: Societaj aranĝoj por faciligi kaj agrabligi kuneston de kursanoj kaj doni eblon al konversacio en bona humoro kaj amuzo. Ekskursoj, prelegoj, danco, banado, naĝado en la belega pejzaĝo apud la Mácha-lago.

*Loĝado kaj manĝado* estos en la Grandhotelo por fiksa prezo Kčs 1070.— po persono. En la prezo jam enestas ankaŭ la kurskotizo.

La kursgvidanto estas la subskribinto. Al li sendu la aliĝojn kaj la pagojn. Indiku, pri kiu el la tri kursoj Vi interesiĝas!

Karel Šolc,

ŝtate ekzamenita Esperanto-instruisto en Mladá Boleslav, Železná 41.

*Atestoj pri kursfina ekzamenno (tre belaj formuloj) estas jam riceveblaj. Po 2 Kĉs. Kursgvidantoj petu oferton de nia Libro-Servo en Praha 47.*

*Ŝakistoj - esperantistoj anoncu Viajn adresojn al JUDr Václav Faigl en Zlonice 6. Estas preparataj turniroj de unuopuloj, interŝtataj kaj intergrupaj.*

*Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj. S-ro P. Korte, Nederlando, skribis pri tiu organizo, ke ankaraŭ ĝi ne povas reviviĝi. Sed li proponas, ke provizore oni provu: 1. instigi al geinstruistoj formi landajn grupojn. 2. per korespondado diskuti kun diverslandaj gekolegoj pri internacia geinstruista organizo, kaj. 3. se eble restarigi internacian kontaktilon (Int. Pedagogia Revuo). Volonte s-ro Korte volas provizore esti la centra punkto. Adreso: Scholstraat 13, Veendam (Nederlando). Niaj legantoj turnu sin al prof. T. Kilián en Třebíč.*

*Korespondi kun ĉeĥoslovakoj deziras.*

Barbieux Max, 44 rue Constant Mé-nier WASMUEL - LEZ - MONS, Belgio.

Escoyez Félicien, 19 rue du Peuple TERTRE (Hainault), Belgio.

Chantry Robert, 120 rue de Cuesmes, FLÉNU (Mons), Belgio.

Copiau André, 182, rue de Ciplu CUESMES (Mons), Belgio. (Ĉiuj kvar pri metalurgio).

Delguedre Gerard, 86 rue de Mons, HARVENGT, Belgio. Pri mino.

Follaets Robert, 18 Lieven Gevaertstraat, OUDE-GOD (Antwerpen) Belgio.

Vanden Brande Victor, 109 rue Ferd. Lenoir, JETTE - BRUXELLES, Belgio.

S-ino A. Coppé, 59 P. Beyestraat, DEURNE-C-ANTWERPEN, Belgio.

Alf Nilsson, BRUNNSTORP (Hus-kvarna). Svedujo. Kolektas poŝtmarkojn, monerojn, poŝtkarton, rememoraĵojn.

Ivan K. Vasilev, ul. Batek 26, PA-ZARDJIK. Bulgario. Organizas kolektivan aŭ individuan korespondadon.

*Donaco. Bohumil Vopršal el Třebovice v Ĉeĥách donacis al la Asocio K 500.— por honorigi rememoron pri sia mortinta filino Drahuška (en novembro 1945), kiu tre amis Esperanton, kiel kortuŝe esprimas sian dolorsenton la estiminda patro.*

*Mallongajn leterojn pri aktualajoj en Ĉeĥoslovakujo deziras ricevi sveda esperantisto, kiu tradukos ilin en la svedan kaj publikigos en svedaj gazetoj. Ĝi signifos tre utilan faron por Esperanto same kiom por nia respubliko. Sendu tiajn leterojn pri difinitaj aferoj al Erik Osterberg Sabravagen 12 Harnosand, Svedujo.*

*Lernolibro de J. Šupichová*

estas havebla! Mendu tuj! Po Kĉs 10.—, afrankite Kĉs 12.40. Mendojn sendu al Esperanto Asocio en Praha 47 sur poŝta pagilo n-ro 9.602.

Julie Šupichová:

*Zajmáte se o esperanto?*

Vše Vám o něm poví 150 otázek a odpovědí v této knížce.

Cena Kĉs 7.20 i s poštovným.

Julie Šupichová:

*Esperantský dopisovatel*

*Esperanto-korespondanto.*

Gvidilo, kiel skribi privatajn kaj komercajn leterojn en Esperanto. Cena i s poštovným Kĉs 17.40.

*Administrace děkuje čtenářům, že tak trpělivě čekali na první číslo. Prosí je, aby oni nenechali ji čekat na přihlášku a předplatné. Třetí číslo můžeme poslati jen tomu, kde se předplatí nebo pošle vyplněnou členskou přihlášku. Místní odbory pošlete seznamy členů, za něž nám odvádíte příspěvky (po Kĉs 55.—)!*

G. Vovelle, instruisto, Ecole du Boulevard Chasles, CHARTRES, (Eure et Loir) Francujo - serĉas en Ĉeĥoslovakio instruiston-samideanon. Li dezirus starigi kolektivan interkorespondadon por siaj 11—12 jaraj lernantoj kaj lernantoj de la ĉeĥoslovaka instruisto.

Jarlibro de

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

aperos en aprilo.

Por ke Vi ricevu ĝin taŭgatempe, paĝu Vian kotizon tuj! Kĉs 40.— de Membro kun Jarlibro. Kĉs 90.— de Membro-Abonanto. »Esperanto internacia« aperas monate.

Ĉefdelegito por ĈSR J. Šustr en Praha I, Benediktská 11.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO EN GENÈVE

reviviĝis post la milito kaj de januaro 1946 aperigas dumonate sian organon »*Esperanto*«. Kotizo de Membro-Abonanto estas Kĉs 60.— de MJ 40 Kĉs. Peranto por ĈSR estas Fr. Slavík en Praha 47.

*Heroldo de Esperanto* redaktata de s-o Teo Jung, kiu ankaŭ travivis la germanan inferon, ekaperados, komence laŭ ebleco, pli poste semajne. Abono por jaro 1946 Kĉs 90 sendebla per poŝta pagilo N-ro 9.602 al nia Asocio.

KOTIZOJ DE LA ASOCIO.

Aktiva membro (kun la organo) Kĉs 70.— Mem.-familiano (sen la organo) Kĉs 20.— Studentoj (kun la organo) Kĉs 30.— Studentoj (sen la organo) Kĉs 20.— Abono de la *Esperantista* (sen membreco) Kĉs 60.—

*KOREKTO.* Sur paĝo 11-a en la unua numero en la listo de komitatanoj elfalis pro preseraro nomo de s-o *Josef Vondroušek en Brno*, U botanické zahrady 31. Bonvolu ĝin en-skribi en Vian ekzempleron, por ke Vi havu la liston de komitatanoj kompletan.

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel, a nakladatel Svaz esperantistů ĈSR v Praze 47. Redaktor Dr. Stan. Kamarýt. Tiskem Jar. Strojila v Přerově. Účast na poštovní novinové službě povolena ředitelstvím pošt v Brně čís. jedn. IA-4-2370-0/37132 - 15. 3. 46. Dohlédací poštov. úřad Přerov 2.